INTERNI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 226 Februaro, 2005

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas $8, por Usono $12, kaj por aliaj landoj estas $20

☆ ☆

La Naŭa Heredaĵa Foiro en Nova Skotio

S-ino Shirley Nicoll, la Regiona Kunordiganto de la prestiĝa Programo Historia ("Historica" Program en la angla) por la Ŝignekto-Centra (Chignecto-Central) Lernejestraro, kaj ankaŭ la Provinca Kunordiganto de la Heredaĵa Foiro en Nova Skotio, kontaktis min kun peto, ke mi instruu laborkunsidon ĉe la ĉi-jara Heredaĵa Foiro, kiu okazos la 6-an de majo ĉe la Komunuma Kolegio en Truro. Kompreneble mi jesis, ĉar estas ĉiam bone, kiam oni povas renkonti kaj paroli al gejunuloj por ke ili lernu iom pri Esperanto.

Ne estas facile reklami pri Esperanto en Nova Skotio, precipe en mia regiono kie estas multaj malgrandaj vilaĝoj kaj malmultaj urbetoj kaj urboj. Oni bezonas aŭton por vojaĝi de loko al loko ĉar, plejparte, ne ekzistas publika transportado, krom inter la grandaj urboj. Pro tio, mi ĝojas, ke S-ino Nicoll denove petis, ke mi instruu laborkunsidon por tiu bonega Kanada edukada programo Historia ĉe ĝia regiona Heredaĵa Foiro en Truro, Nova Skotio.

— Kim Keeble

KONFESOJ DE OKDEK-KELK-JARULO

Pro tio, ke ĉi-monate mi festis la 82an naskiĝdatrevenon, oni permesu min fari kelkajn komentariojn. Mi scias, ke maljunuloj emas tro paroli, eble pro sento de soleco. Do, se vi estas juna kaj jam enuas, ignoru ĉi tiun artikolon kaj pretersaltu al la sekvanta — mi permesas.

Estas al mi miraklo, ke mi atingis ĉi tiun aĝon. Mi faris nenion por meriti. Estas afero de genoj kaj bonŝanco, afero de Dio aŭ dioj, de sorto kiun neniu povas antaŭvidi. Mi estas tre dankema sen scii kiun aŭ kion dankdiri.

Mi rimarkis, ke kiam oni demandas de centjaruloj, „kio estas la sekreto de via longa vivodaŭro?", la respondoj estas tre diversaj. Kelkaj trinkas ĉiutage glason da vino, aliaj abstinas de alkoholaĵo. Kelkaj observas rigidan dieton, aliaj manĝas laŭplaĉe. Kelkaj persiste ekzercas sin por la muskoloj, aliaj sufiĉe ripozas. Pro tio mi rajtas supozi, ke ankaŭ inter ili neniu fakte scias.

Malgraŭe, mi diros, ke mi neniam fumis (krom en unu sola kaj forgesinda tago) kaj, laŭ elpensita vivoplano, mi ne eĉ trinketis alkoholaĵon ĝis la aĝo de 50 jaroj. (Nun mi trinkas, eble tro, antaŭ ol enlitiĝi.) Mi ĉiam manĝis tro, pro tio, ke la manĝaĵo al mi tiom bongustas. Dum kvindek jaroj, dum la studoj kaj praktiko de ĥirurgio, mi nekredeble laboregis, en kondiĉoj de terura streso. Sufiĉe ofte mi laboris senĉese, sendorme dum 40 horoj (eĉ pli) en la kliniko, operaciejo, kaj en la departemento por urĝaj kazoj. Kiam la edzino forlasis min, ŝi raportis al la tribunalo, ke mi laboris 84 horojn ĉiusemajne. Ankaŭ sabate kaj dimanĉe ofte mi estis en la hospitalo kaj kabineto, kaj miaj someraj ferioj daŭris 2 ĝis 5 tagojn. El memsperto mi kredas, ke laboro kaj streso ne povas mortigi homojn.

Malgraŭ la kondiĉoj, mia vivo kiel ĥirurgo kaj profesoro de ĥirurgio estis ege interesa. Mi estas kontenta, ke mi helpis multajn pacientojn, lernis multon, kaj kontribuis al la instruado de multaj estontaj kuracistoj kaj ĥirurgoj.

Por mi la plej gravaj atingoj de la vivo estas la infanoj, filino kaj filo. Iel mi sukcesis pasigi iom da tempo (neniam sufiĉe) kun la etinfanoj en la pliparto de la vesperoj kaj semajnfinoj. Ni konversaciis, ludis kaj kunlegis: mi legis la vortojn kaj ili legis la bildojn. Mi supozas, ke mi patris mezbone, sed la plejparto de la kredito apartenas al mia eksa edzino, ke la gefiloj normale plenkreskuliĝis: la filo nun profesoras en NovLando kaj la filino praktikas medicinon en Kalifornio. Mi rimarkas kun kontento, ke ambaŭ estas amantaj kaj dediĉitaj gepatroj.

Esperanton mi lernis meminstrue kiam mi estis dekkelkjarulo. Mi unue vidis mencion de la lingvo en la ***Manlibro por Skoltoj***. Mi tiam studis la latinan kaj la germanan en la lernejo, kaj lingvo logika, sen esceptoj, sen neregulaj verboj,

multe altiris min; mi mendis librojn, lernis la lingvon lege-skribe kaj korespondis. Kiam oni demandas min kiam mi fariĝis Esperantisto, mi duonŝerce respondas, ke estis kiam mi unuafoje vidis la tabelvortojn aŭ korelativojn; la bela logiko frapis min.

Venis la milito kaj mi devis soldati. Poste mi devis studi medicinon kaj ĥirurgion, kaj poste mi eniris la vivon de ĥirurgo kaj profesoro: klinikoj, operacioj, prelegoj, esploroj, ekzamenoj, urĝaj kazoj, konferencoj, verkado de sciencaj referaĵoj, kunvenoj de komitatoj, instruado de individuaj studantoj, kursoj, legado por memlernado — mi devis tute forlasi Esperanton, sed mi neniam forgesis ties idealojn kaj celojn.

En la jaro 1985 la Kanada Esperanto Asocio kongresis en Halifax. Mi subtenis kaj partoprenis, sed estis embaraso, ke mi povis apenaŭ paroli. En la jarkunveno, gvidita de la tiama prezidanto, profesoro Ian Richmond, mi povis kompreni nenion. Mi pensis pri la venonta emeritiĝo, kaj mi decidis malkabei. Mi aliĝis al nia loka Esperantista rondo por akiri kapablon konversacii. En la jaro 1987 mi unuafoje partoprenis en la somera kursaro en SanFrancisko. Bill kaj Cathy Schulze renkontis min ĉe la flughaveno kaj alportis min al la kursloĝejo ĉe la tereno de la Universitato. Tiel komenciĝis multjara vojo por fariĝi lingve kompetenta.

Mi diru, ke ***Inter Ni*** estis al mi grava ilo en la longa lukto por regi nian lingvon. Mi kredas, ke Harry Lewis, kiu fondis ***Inter Ni*** (1986) kiel organon de nia loka rondo, havis la ideon ekde la komenco, ke ĉiuj el ni devas verki kaj aperigi artikolojn. Tiel oni lernas. Eĉ kiam oni faras erarojn, oni lernas. Kompreneble, ***Inter Ni*** multe maturiĝis dum la preskaŭ 19 jaroj de sia esto. Nun niaj legantoj kaj niaj verkistoj loĝas en multaj landoj. Harry Lewis estis la unua redaktoro kaj li mem kompostis. Kiam Bob Williamson fariĝis redaktoro en 1989, mi komencis komposti; mi ŝatas tiun taskon kaj la defion krei ion belan por allogi la legantojn.

Mi ne deziras ĉi tie paroli pri mia laboro por Esperanto kaj mia vivo en Esperantujo. Sufiĉas diri, ke Esperanto restas granda konsolo en mia vivo. Mi ŝatas verki, mi ŝatas komposti, kaj mi multe korespondas. Grandparto el miaj amikoj estas Esperantistoj. Mi loĝas sole (pli pro hazardo ol volo) kaj tute komforte en granda domo ŝtopita de libroj kaj apud lago, inter arboj, birdoj kaj sciuroj. Dommastrumino kaj ŝia edzo prizorgas la domon. Mi sufiĉe sanas. Nuntempe mi studas matematikon en la universitato kaj tiel esploras belan mondon de ideoj pri kiuj mi ĝis nun sciis malmulte. La vivo estas bona.

— Steĉjo

Estimata Redaktoro-Moŝto:

Lastatempe la usona prezidanto Bush venis al nia urbo kaj elparolis grandan prelegon por klarigi al ni kanadanoj kion ni devas pensi kaj fari. Mi ne invitis lin al nia urbo, sed egale li ne invitis min aŭdi sian prelegon. Tamen, mi tre atente vidis kaj aŭskultis la tutan aferon per la televido. La longa prelego pensigis min pri demando pri kio mi jam de longe scivolis kaj tute ne komprenis: „Kiomfoje oni devas diri mensogon antaŭ ol ĝi fariĝas vera?"

Mi esperas, ke vi povos klarigi al mi ĉi tiun profundan misteron.

Mi restas tre respektoplene la via,

Kon Fu Zita

Estimata S-ro Zita,

Multan dankon pro via kiomfoja demando. Unue venis al mi en la kapo la nombro 42, sed tio estas la respondo al tute alia demando: tiu „pri vivo, la universo kaj ĉio." Poste venis al mi la fama rekantaĵo „la respondo ja blovas en la vent'." Sed eble vi jam aŭdis pri tio, kaj deziras ion pli konkretan.

Evidentiĝas, ke mensogo neniam povas fariĝi vero pro tio, ke ĝi ja estas mensogo. Tio estas kontraŭo de terminoj. Tamen, oni povas iom post iom sufiĉe alkutimiĝi al mensogo por povi forgesi, ke ĝi estas malvera. Sekvas, ke la nombro da ripetoj necesaj por „verigi" mensogon dependas de ĝia grandeco. Ju pli granda estas la mensogo, des pli ofte oni devas diri ĝin antaŭ ol ĝi ŝajnas vera. Mi ne scias kiel precize mezuri la grandecon de mensogo, sed mi konscias ke kelkaj estas etaj kaj kelkaj ja estas grandegaj.

Parenteze, oni devas atenti pri aparte stranga fenomeno, kiu rilatas al la grandegaj mensogoj. Preter la limo de malkredemo, giganta mensogo bezonas malpli multajn ripetojn por fariĝi vera. Ni povas do supozi, ke la nombro da fojoj necesaj por fari mensogon kredebla sekvas kurban linion: eta mensogo bezonas nur unu ripeton, pli granda bezonas kelkajn ripetojn, eĉ pli granda bezonas multajn ripetojn, sed giganta bezonas nur malpli multajn ripetojn.

Krom la grandeco, estas aliaj parametroj pri kiuj oni devas konscii: la aspekto kaj la odoro. Por mallongigi la tempon necesan por bildigi mensogon kiel veron, oni devas beligi ĝin. Homoj kutime ne deziras kredi malbelajn diraĵojn, sed ofte englutas la belajn aferojn sen troa zorgo pri ilia vereco. Kiel vi povas imagi, multaj esploristoj serĉas la respondojn al tiuj demandoj.

Dankon denove pro via scivolemo deziras

via redaktoro